



ALDONO AL „POLA ESPERANTISTO”.

KELKAJ NOVELOJ

EL


diversaj aŭtoroj.

VARSOVIO.

ELDONO DE JAN GÜNTHER.

1909.

Esper. 477 I



Doł. do V-644

Presejo: L. Bogusławski, Varsovio — Ś-to Krzyzka 11.

ANDRZEJ NIEMOJEWSKI.

El la „Epoko de Eŭnukoj”

(*fragmento*).

En ekstrema fasado de sia palaco sidas sur ebura seĝo Adar-Malik, kaj apud li staras malplena pokalo.

Li ne tuŝas ĝin hodiaŭ.

Li estas pala kaj enpensiginta, li fiksis siajn okulojn sur desegnaĵojn de la planko, kiuj prezentis rondojn kaj rondetojn, kaj multangulojn, kaj plej diversajn liniojn.

En la distanco de ses paŝoj de li staras la eŭnuko Ajja. Liaj arbustosimilaj brovoj preskaŭ tute ŝirmis liajn bluajn okulojn.

El la ĝardenoj fluas sonoj de muziko kaj kanto, kaj ĥora rido, kaj granda bruo de senĉese daŭranta festeno.

Ajja parolas, kaj Adar-Malik aŭskultas.

Kaj Ajja parolas jene:

— Vi vidas, sarri, kio eventas. Dum longa tempo Sin rigardis tion. Li rigardis per maldekstra okulo kaj silentis. Li ankaŭ rigardis per la dekstra kaj miregis. Fine li rigardis per ambaŭ okuloj kaj demandis: — Ĉu vere mia nevo Adar-Malik regas Hekalon? Ĉu vere hereda saĝeco flugas super lia baldakeno, kaj el la kruceto, kiun li portas sur la brusto, ĉu eliĝas la fajro, kaj lumo de konsilo? Longedaŭran suferon tiu demando kaŭzis al mi. Ja vidu, jen du viaj turtanoj estas de iu nekonato mortigitaj, kaj la morto, kiel malsata leono eble jam

nun postmarŝas la aliajn! Hekal furiozas. Malbraveco komence vidiĝis nur en privataj domoj kaj sanktejoj, kaj nun ĝi enpenetris en la turtanejojn kaj en la tendojn de via armeo. La brako de militisto malfortiĝis, kaj la armilo falas el lia mano. La mano kaptas citron kaj ŝalmon, kaj anstataŭ militinsignoj oni vidas en ĝi florojn kaj pokalojn. Eĉ maljunuloj, kiuj mezuris vojiron de steloj ŝanĝis sin en frivolajn dandojn, kaj anstataŭ serĉi scion, ili amindumas koketinojn. La sankta danco religia fariĝis nun danco de malĉasteco, kaj la kanto fariĝis ilo flamiganta la sangon al volupto. Kaj nun kiam vi aŭskultas mian plendon, furiozaj danc-oj, sonorado de pokaloj kaj ŝtelita amo festenas la tagojn de sia plena libereco. Vere, oni povas ripeti tion, kion diras tiu habira popolaĉo, ĵaluze kaj malamike rigardante al niaj ĝardenoj:—kalkulita, pesigita,—sed, sarri, ĝi povas esti ankaŭ—dividita! Kreskas Babilono kaj Ninivo kreskas. Inter gentoj de dezerto ĉiam estas iu suspekta movado. Ĉi tie ventegoj okazas ofte, kaj detruas ĉion, kion ili renkontas sur la vojo de sia potenca blovado. Kio estas kalkulita kaj pesigita, tio povas esti dividita ankoraŭ pli frue, ol tion povus supozi la mesto eĉ plej singarda.

Tiel parolis Ajja. Kaj en lia parolo estis io, kvazaŭ grakado de vulturo. Adar-Malik aŭskultis, nur de tempo al tempo glatante sian frizitan barbon.

Fine li levis de ornamita planko siajn reĝajn okulojn, kaj explore fiksis ilin en turtanon de eŭnukoj.

Se mi pripensus viajn vortojn, kian konsilon vi donus al mi?

Ajja ne tuj respondis.

Komence li longe rigardis la reĝan vizaĝon por diveni, kian impreson faris sur la reĝon liaj asertoj. Kaj kiam li jam divenis tion, li zorge pripensis, en kiajn vortojn li devas vesti sian konsilon. Kaj poste li ankoraŭ esploris reĝan vizaĝon por diveni, ĉu lia konsilo estos ĝustatempe donita.

Kaj kiam li ĉion ĉi jam pripensis, li malfermis la buŝon de sia vultura vizaĝo, kaj tiel parolis:

— Eksiĝi kaj malaperi devas la turtano Oreb.

Adar-Malik prenis malplenan pokalon kaj per ĝi malpeze frapis alabastran tablon, klininte samtempe la kapon, kio signifis: tiel estu.

Tiam Ajja ree parolis:

— Eksiĝi kaj malaperi devas la turtano Matannabi, kiun jam ĉirkaŭprenis la brakoj de voluptemo kaj infektis per sia veneno.

Adar-Malik pensis dum momento, sed baldaŭ prenis malplenan pokalon, kaj per ĝi malpeze frapis alabastran tablon kaj klinis konfirme la kapon, kio signifis: tiel estu.

Tiam Ajja detenante la spiradon, tro rapide eliĝantan el la pulmoj, diris:

— Vi ŝlosos en maldekstra fasado de l' palaco Zibea'n kun ŝiaj sklavinoj, kaj lasos ŝin sub la gardo de turtano ne pasia, kia estas Zeeb.

Adar-Malik triafoje prenis malplenan pokalon, frapis per ĝi alabastran tablon, kaj kun granda certeco klinis la kapon, kio signifis: jen tion mi volas.

Tiam Ajja kunmetis la manojn sur la brusto en Signon de l' Vivo, profunde riverencis, kaj,

klinite al designita planko, plena de rondoj kaj rondetoj, kaj multanguloj, kaj plej diversaj linioj, diris:

— Serviston vian plej humilan kaj malplej pasian vi faros turtano super turtanoj, por ke li disdonadu ĉiujn oficojn al la homoj de si elektitaj, kaj subtenadu falantan turon de via regado.

Adar-Malik levis malplenan pokaĵon, kaj kun granda soleneco trifoje frapis per ĝi en alabastran tablon.

Tian Ajja rektiĝis, kaj lia vultura vizaĝo esprimis la rideton de eksplodanta fajro.

Adar-Malik manfrapis.

Sur la sojlo aperis la estro de lia sekvantaro. Malik turnis la vizaĝon en spacon, kaj donis la sekvantan ordonon:

— Ajja, turtano de turtanoj, prenas en tiu ĉi momento la regadon de l' tuta armeo, eminentuloj, sanktejoj, kaj de la tuta mia urbo Hekal. Per li mi anoncos al ĉiuj mian volon. Kion ajn li ordonos, estu plenumita. Tiel estu ĝis mia estonta ordono.

Ajja, ĉe tiuj vortoj de l' reĝo ree kurbiĝis kaj kvazaŭ rigardis sur designitan plankon plenan de rondoj kaj rondetoj, kaj multanguloj, kaj strangaj linioj, sed efektive li observis, kiel tiu ĉi estro akceptos la ordonon.

Sed lia vizaĝo estis kvazaŭ ŝtona, kaj esprimis nenion.

*

*
Ĉu vi vidis iam aglon, sin ĵetantan el supre sur nesingardan aron da gazeloj? Ili deŝiras libere la florojn, saltetas, volupteme sin tuŝante per kapetoj, subite ilin kaptas teruro,

ili diskuras en ĉiujn flankojn, aŭ amasiĝas plende blekante?

Kaj ĉu vi vidis, kiel teruro falas sur amuziĝantan kortegon, kiel festenantoj lasas elfali el siaj manoj gravuritajn kristalojn, kiuj rompas sin sur la planko, kiel ili renversas la seĝojn, kaj, alkroĉiĝinte, mem falas, farante nepriskribeblan bruon?

Kaj la dancistinoj kiel timigitaj koturnoj, kaj kiel muzikistoj, ĵetas for instrumentojn, kaj en timo ĵetas sin vizaĝe sur tapiŝojn?

Tia estis la konfuzo, kiam dum brila festeno subite enkuris Ajja kun siaj militistoj, kaj direktiĝis al baldakeno por kapti la turtanojn Oreb kaj Matannabi....

*

Virino Hekala! Kiel ŝanĝiĝis nun via eksteraĵo!

Kaj via urbo kiel ŝanĝiĝis!

En viaj ĝardenoj oni ne aŭdas plu zumadon de kordoj nek fajfon de salmoj. Kaj muzikiloj sonas nur en sanktejoj kaj en la tendoj de militistoj.

Kaj neniu dancas inter floroj apud la akvujoj. Sanktaj dancoj revenis al temploj, kaj ĝojigas ekskluzive la vizaĝojn de dioj.

Kiel modestaj estas viaj festenoj!

Kie estas la birdoj? La koturnoj, la kolomboj? Kie estas tiuj pledoj da kukoj, kaj kie via vino, tiu fluida rubino?

Virino de Hekal, mi ne povas eĉ rekoni vin!

Jen estas Ajja. Li nun aranĝas viajn tagojn, kaj li estas eŭnuko.

Li ŝlosis vin ĉe teksiloj, kaj ordonis al vi teksti vestojn.

Vi devas labori, virino Hekala, kvankam por volupto vi estis kreita.

Maljunuloj revenis sur siajn altajn turojn, prenis ĉizilojn, kaj ree notas sur brikoj siajn signojn. Ili ankaŭ mezuras vojiron de steloj, ĉesinte mezuri tiun de koketinoj.

Militistoj ne surmetas festan veston, kaj konsideras vinon, kiel abomenaĵoj. Ili nur ekzercadas sin en uzado de armiloj kaj streĉado de pafarkoj.

Do ili estas severaj, kaj ne ridetantaj. Ili devas esti bravaj, kaj ne agrablaj.

Ankaŭ neniu frivola kanto makulas plu la buŝojn; nek kanto pri la beleco de korpo virina, nek kanto pri pasioj de l' amo, nek kanto pri perfidita edzo, kiun jam mokas ĉiuj, kaj li mem nenion scias pri tio.

Ankaŭ virinoj estas apartigitaj de viroj, kaj metas ŝirmilojn sur siajn vizaĝojn, ĉar el la vizaĝo de preterpasanta viro falas iafoje sorĉo nevenkebla kaj kaŭzas malfeliĉon.

Ĝi kaŭzas ŝteladon de edzinoj, edzmortigon kaj konfuzon.

Nun estu nur ordo. Ordo en ĉio. Ordo en laboro, kaj ordo en ripozo. Ordo en semado, kaj ordo en rikolto.

Ordo en kreado, kaj ordo en detruado. Ordo en serĉado de amo, kaj ordo en uzado de tiu ĉi amo.

Ordo en inspiro, kaj ordo en ĝuado de produktaĵoj de inspiro.

Tiel instruis turtano de turtanoj, Ajja, kio signifas vulturo, ĉef-eŭnuko, la unua volo de Adar-Malik.

La volo kaj la menso. La menso kaj la koro. La saĝo de l' regno, kaj la saĝo de ĉiu regnanto.

Kaj Ajja faris sian ordon.

Li mem komandis la tutan armeon, kaj kun neniuj dividis sian poteneon, ĉar li pensis: Bone estas, ke ĝi koncentriĝas en unuj manoj, kaj bone estas, ke tiuj manoj estas miaj.

Kaj poste ĉiujn oficojn li disdonis nur al eŭnukoj.

Do la eŭnuko Kilamcach okupis sin pri la esplorado de vojoj, tra kiuj marŝas la steloj sur nokta ĉielo.

Kaj la eŭnuko Ĥardispi fariĝis estro super ĉiuj temploj, kiuj estis konstruotaj.

Kaj la eŭnuko Ĥarhar okupis sin pri la konstruo de la kanalo, kiu larĝe ĉirkaŭzonos la ĉefurbon.

Ankaŭ la eŭnuko Til-Barsip prenis la estracon en la skribado de kronikoj kaj de reĝaj ordonoj.

La eŭnuko Bit-Jakin komandis la ĥorojn kaj la muzikon.

Dancon kaj ĝenerale graciecon instruis la eŭnuko Nagitu.

Pri la edukado de virginoj, ĉirkaŭantaj la reĝinon, pri inokulado al ili de bonaj manieroj kaj de agrabla sintenado zorgis la eŭnuko Ĥupapanu.

Kaj ĉiujn skulptistojn, pentristojn kaj verkistojn de himnoj prenis sub sian ekskluzivan protekton la eŭnuko Anzan, kiu ankaŭ enkondukis grandan elokventecon kaj supermezuran moderecon.

Kaj la eŭnuko Muñezib okupis sin pri la enkonduko de novaj leĝoj, kiuj enrigardis en ĉiun bagatelajon de l' vivo, de okupoj, de intencoj jam deciditaj kaj ankoraŭ tute ne deciditaj.

Hekal, la urbo de bruaj kaj svarmantaj tabanoj ŝanĝis sin en abelujon kies distingilo estas granda, neniam ŝanĝota, dum miljaroj daŭranta: ordo.

La ordo, sur kiu apogas sin la ĉielo kaj la tero, la ordo, kiu mankis en Hekal antaŭe, dum la administrado de turtanoj amemaj, plensanĝaj kaj tre pasiaj, kaj kiu instaligis nun en la epoko, kiu poste estis nomita de diverslandaj kronikistoj: epoko de eŭnukoj.

*

Tamen post kelkaj jaroj la ordo pure ekstera komencis fariĝi ankaŭ la ordo interna.

De manoj kaj piedoj ĝi trairis al cerboj kaj animoj.

Ekregis plena atrofio de mensoj.

Hekal, la mirinda urbo, kiu spiris per eterna printempo' fariĝis nun simila al antaŭtempe velkinta aŭtuno.

Ĉiu floro pentrita sur muro, estis malviva. Ĉiu himno, kiu sonis en templo, estis tre solena, sed ankaŭ tre enua.

Ĉiu kroniko, kiun junularo estis devigata legi en lernejoj, efikis kiel bonega dormigilo.

La junularo lernis en tiuj ĉi lernejoj la himnojn al dioj kaj diinoj, la himnojn, verkitajn de eŭnukoj.

Tiuj ĉi himnoj estis plenaj de soleneco, sed oni babilis ilin senpense, kaj jen pereis la ĉarmo de iama Hekala elokventeco.

La kantoj, kiujn oni ludis sur diversaj instrumentoj estis tre saĝaj, sed en ili ne murmuris plu la ventoj de l' monato Ninib, nek oni aŭdis en ili la trilon de birdetoj, kiel tio estis antaŭe.

La sanktaj dancoj refariĝis tre konvenaj, sed la dancistinoj dum la danco oscedis, kaj

la pastroj, antaŭe tiel avide observantaj ilin, nun rigardis dormeme kaj indiferente.

Oni manĝis simplajn nutraĵojn, sed tre multe. La homoj iĝis grasaj kaj dikaj. Kontraŭ tio la turtano de turtanoj povis trovi nenian rimedon.

Eĉ komencis naskiĝi aliaj infanoj.

Ili havis la fruntojn tre malaltajn, kaj la fizionomiojn tre malsaĝajn, kvazaŭ ili estus naskitaj ne de l' amo, sed de l' enuo, aŭ io alia.

En la aĝo de 13 jaroj, kiam la knaboj kaj la knabinoj ordinaro geedziĝas, oni neniel povis komprenigi al ili tiel simplajn aferojn, kiel: dekstre, kaj maldekstre.

La infanoj fariĝis junuloj, junuloj—viroj, kaj jen en la daŭro de nemultaj jaroj la urbo de fluida rubino aliformiĝis en urbon de nepenetrebla mallumo kaj malkapableco.

Eĉ divenistoj de estonteco havis la receptojn, laŭ kiuj oni esploris ĝin. Do iliaj predikaĵoj fariĝis senimpresaj, same, kiel senimpresa kaj ĉiam kvieta estas la bluo ĉiela dum tagmezo.

Vi rigardas, kaj ĝi nenion parolas al vi. Vi rigardas atente, kaj vi nenion rimarkas.

Lumas nur unu granda, senĉesa brilego, blindiganta la okulojn, kaj ne permesanta sin vidi. Ĝi estas, kiel diris posteaj kronikistoj, granda brilego de la epoko de eŭnukoj.

Ĉirkaŭe kreskis kaj aliformiĝis la vivo. Hekal restis senŝanĝa.

Ĉirkaŭe naskiĝadis novaj vivkondiĉoj, kaj malaperadis malnovaj. Hekal pri ĉio ĉi ne atentis.

Ĉar ĝi rigardis nur sin mem, kaj sian ekster-

ordinaran ordon. Kaj tiun ĉi ordon kaj ĝian bonan spiriton kreis konata al neniu, konata neniam, kvieta, regula, senpasia, laborama, kun komparita jam abelujo: epoko de eŭnukoj.

Al abelujo. Jes. Abelujo, zorgante pri nenio ekster si, konstruas siajn ĉelarojn, kaj kolektas mielon; tamen eĉ tie laboranto movigas iafoje siajn travideblajn flugiletojn, kaj forflugas malproksimen al floroj,—trinki ilian dolĉan mielon.

Ĉi tie eventis apartiĝo inter floroj kaj abeloj.

La floroj ne naskis mielon, kaj la abeloj faris nur siajn ĉelarojn el ricevita de ie cero.

trad. *A. Ossowski*.



FULMSUBITAJ FOTOGRAFAĴOJ.

El muziko.

I. La gurdo.

Tiu, kiu elpensis la gurdon, sidas en la infero. Tiu ĉi puno estas tro malsevera rilate lian kulpon — kaj se la providenco ne estus sin direktinta al la eldono de l' dekreto per sia bone konata kompateco, la kaŭzinto de tiu eltrovaĵo devus esti multe pli severe kondamnita, ekzemple per forsendo sur la teron por deviga aŭdado de l' gurda muziko, almenaŭ dum tri horoj tage.

La gurdo, krom sia nomo, enhavas nenion artistan, malgraŭ, ke en la protokoloj de l' aŭtoritatoj, kiuj liveras pro ĝi licencion, ĝi estas apartenigata al artista industrio. La aŭtoritatoj zorgantaj pri tiu artparto kaj pri bona humoro de l' publiko, penas pli plej granda disvastigado de l' gurdo por ĉiama ĝojigado de l' loĝantoj, kiujn oni jam ne povas ekĝojigi per la altigo de l' impostoj.

La ĉefa tasko de l' gurdo estas do la gajigado de l' urbanoj kaj oni devas konfesi, ke ĝi plenumas tiun taskon honeste kaj eĉ multe super la normalaj postuloj de l' aŭdantoj.

Tamen, ĉar ne ĉiuj estas egale defendemaj kontraŭ la plezuroj, tial iuj ekĝojigas sub ĝia

influo, tiel forte, ke ilia plej proksima familio estas devigata ilin meti al la kuracista observado.

La gurdo havas siajn principojn, el kiuj plej grava estas ĝia modesteco. Difere de aliaj estaĵoj produktantaj la muzikon, ĝi ne postulas aplaŭdojn, ne atendas bisvokadojn, sed de si mem ĝi, aldonas volonte novajn pecojn, eĉ kiam ĝi ne estas certa ĉu plaĉis la antaŭaj.

Ĝi ne ŝpariĝas kaj ludas longatempe. Estas du kaŭzoj pro kiuj ĝi tiel faras. Se ĝi ne ricevas honorarion, ĝi ludas, ĝis oni pagos la decaĵon, en ĝusta konvinko, ke tian muzikon ĝi devas nepre sekvi. Anstataŭe, se iu pagas ĝin tuj de komenco, por ke ĝi pli rapide ĉesu ludon kaj foriru, ĝi volas montri sian konecon de bona edukado kaj repagas lin per ludado de tuta repertuaro, por ke li ne pensu, ke ĝi postulas monon donace kaj ke ĝi ludas nur por pago.

Koncerne la muzikon mem, la gurdo havas tiun noblan principon, ke ĝi daŭrigas multajn malnovajn ariojn, kiu sen tio, estus jam de longe pereintaj — sed ĝi ne evitas ankaŭ la novajn, kiujn ĝi, — pro timo ke ili ne estu tro ripetkonataj—prilaboras kaj reformigas konvene, sonorigante ilin iamaniere en dua, korektita eldono.

Oni povus nur unu riproĉi al gurdo, ke kiel ofta gasto, kiu alvenas pro mono, ĝi preskaŭ ĉiam faras viziton en malkonvena momento. Ne pro tio, ke ĝi ĝuste malhelpas, ĉar ĝi ja eniras en nenies loĝejon kaj agas nur de malproksime;—sed iafoje la aŭdanto ne estas konforme preparita kaj inspirita—kaj la gurdo ĵus alvenas tiam, kiam li estis okupita per intelekta

laboro, per posttagmeza dormetado, per malpaco kun la edzino, per forĵetado de l' servisto aŭ per alia privata familia afero; kaj vidante, ke la aŭdanto tiamaniere eksterigita el domo viva egalpezo, komencas salti de malpacienco, la gardo tuj komprenas la situacion, surŝovas butonon sur mazuron*) aŭ krakoviakon**) kaj ĝojas, ke ĝi trafis en bonan momenton, ĉar la loĝanto certe deziras danci.

II. La gramofono.

Malĝoja estis la mondo antaŭ kiam oni elpensis la gramofonojn, ĉar la gardo sola por la ĝojigado ne sufiĉis. Unu el mirindaĵoj de l' dudeka jarcento, ĝi kaŭzis evolucion en la muziko kaj gajnis ĉiujn korojn. Iu faris grandan maljustaĵon al gramofono, nominte ĝin „kantanta bruto”, ĉar ĝi ne nur kantas, sed ankaŭ ludas, parolas, deklamas, fajfas, tamburas, trumpetas, malpacegas, kraĉas, bruegas, tusas—aŭ pravdire, ĝi sola anstataŭas, pli aŭ malpli, tutan multenombrian familion, kies ĉiu ano estas siamaniere muzikema kaj kiu iafoje aŭdigas komunan koncerton.

Ĉi tiu ĉiuflankeco kaŭzis, ke hodiaŭ preskaŭ ne ekzistas domo sen gramofono, tiel same, kiel ne ekzistas domo sen gardisto aŭ sen hipotekŝuldoj. Kaj se okaze, iu el ĝiaj loĝantoj ne posedas ankoraŭ gramofonon, trovos sin anstataŭe, ĉiam, iu altruiste inspirita najbaro de

**) polaj dancoj.

unu aŭ kontraŭa flanko, de antaŭo aŭ malantaŭo, kiu lasas en movadon sian gramofonon, direktante ĝian metalan gorgon en flankon de l' najbaro senigita de gramofono, por ke li ankaŭ havu plezuron. Krom la malpacdisputo kun la edzino, la gramofona muziko estas eble la sola agrablajo, kiun oni praktikas por la gajigado de l' proksimulo.

La posedanto de l' gramofono starigas i foje sian instrumenton sur fenestron, kaj ellasas koncerton en straton. Post du numeroj li elrigardas tra fenestro, por esplori, kian influon faris la muziko sur la najbarojn kaj vidante, ke ili ankoraŭ ne furioziĝis, li ellasas sur ilin novan punkton.


La gramofono malliberigas sur siaj sonplataĵoj, diversajn gekantistojn, fajfadmajstrojn, violonistojn, trumpetistojn kaj eĉ tutajn militistkapelojn. Ĉiu sonplato estas iu specialajo; en ĉiu oni aŭdas iun grandan muzikiston aŭ kantistinon. Sed kiam tiu kantistino estas pli aŭ malpli surfrotita de najlo, kiu marŝas super ŝia artverko, ŝi tute perdas sian voĉon kaj devas ricevi eksigon. Tamen la gramofonposedanto faras alie; li ordonas al ŝi kanti plue.

Do la kompatindulino kantante, eĉ pepas de plendo kaj kraĉtusas kiel koko, kiam oni ĝin buĉtranĉas en ĝia floraĝo eĉ se ĝi estus en unuaranga restoracio. Kiam unufoje, iu eminenta kantisto ekaŭdis sian propran voĉon en gramofono, li malĝojiĝis, malesperiĝis, edziĝis kaj devenis fervoja diurnisto. Sed pro tio estas kulpa nek gramofono, nek ĝia elpensinto, kiu avertas, ke la plataĵojn, tiel same kiel la kantistinojn, oni devas senĉese ŝanĝi, se ili devas bone kanti.

La gramofono estas epoka eltroyajo tre disvastigita dank' al siaj bonaj ecoj. Ĝi krom tio faras surprizojn, kiel ekzemple la reŭmatismo, kiu dolorigas neatendite, kaj se vi eĉ estus forkurinta de tiu ĉi instrumento en alian straton, ĝi ankaŭ tie sonas — kaj ofte eĉ duoble.

(El la pola originalo de Kl. presita en Ivova journalo „Vorto pola”)

trad. *Helena Hempel.*



La forbrulo de l' templo de Diano

en Efezo

de Zofio Rylska.

Kia flamo devis bruli en tiu animo ambicia kaj senforta...

Oni venkis lin en la Olimpia vetludo. — Palmo—deziregata palmo de l' venko flirtis en aliaj pli feliĉaj manoj. Li vidis ankoraŭ ĝiajn plumformajn branĉojn mokantajn lin. Lian versajon oni akceptis per eksplodo da muĝo kaj rido.

Ĉie persekutis lin malprospero. Virinoj dorse sin turnis al li—mokplene. Viroj traktis lin per malŝato.

Kial?

Li demandis sin mem, demandis la sorton sian, sed ne trovis respondon.

Ke oni lin malamam, ke oni lin timu, ke oni malbenu lian nomon! — Sed ne! — Oni dorseturnis sin nur de li kun rideto de enuo kaj indiferenteco.

Komence li batalis kun tio, sed la indiferenteco homa pli forta estas ol malamo.

Fine malleviĝis liaj manoj, la animon implikis araneaĵo de malvarmo kaj silento, la okuloj enprofundiĝintaj en la okulkavoj, kovritaj de palpebroj kaŝis la penson, kiu ĝermis en la kranio.

Kaj inter li kaj la homoj kreskis ĉiam pli, unuflanke, la muro de l' indiferenteco—kaj duaflanke-mordanta doloro kaj malamo.

Fine ankaŭ la homoj komencis ne ami la malgajulon, kiu ilin evitis kaj alrigardis duonokule, mokride. — La infanoj malgrandaj vidante lin kaŝiĝis en la faldoj de l' patrinaj vestoj, kaj la patrinoj altiris ilin rapide al si, por eviti al ili la malbonan rigardon.

Tiam li ridis mallaŭte, longe, kaj ĝoje.

Oni lin ne malŝatis jam.

Kaj la penso ĝermanta en la kranio brulis ĉiam pli forte. Fine ĝi eksplodis per flamego, ŝanĝiĝis en teruran brulon, oceanon, torenton da fajro.

*

*

*

Li staris malproksime de la homamaso kaj rigardis la furiozantan elementon kaj la homan ondon kiu penis ĝin sufoki kaj ekregi, sed vane. Li staris kaj ebrilĝadis per la aspekto de l' detruo kaj malespero.

Li sentis sin nune estro de tiu amaso, kiu serpentumis ĉe liaj piedoj en senespera penego.

Li atendis, ĝis kiam ĝi turnos sin kontraŭ li kun muĝo de vundita besto kaj komencos streĉi minacantajn premitajn pugnojn. Kaj tiam li havos sur la lipoj tiun mokridon de l' malŝato, per kiu oni lin donacadis dum la tuta vivo — ridon de repago.

Li drapiris la mantelon sur la brusto, krucigis la brakojn kaj atendis.

*

*

*

La venkita elemento jam trankviliĝis, kaj kun ĝi pereis multjaran vesko de l' pensoj kaj



manoj homaj. Unu el sep mirakloj de l' mondo ŝanĝigis en polvon kaj ruinaĵon.

Sur la vizaĝoj fluis larmoj, la manoj kunplektitaj en muta doloro pendis senkonscie.

Oni ne demandis pri la farinto,—la doloro estis pli granda ol kolero.

Do enuigita pro la atendado li iris al la dolorantaj amasoj kaj komencis paroli rigardante iliajn okulojn senkompate:

— Jen forbrulis la templo, unu el la sep mirakloj de l' mondo — plezuro por la okuloj kaj ĝojo de l' koro. — Ĝi mankas jam—ne vere?—La fajro konsumis en kelkaj momentoj, kion la homoj konstruis en la daŭro de jarcentoj. Forbrulis, forbrulis via plezuro por la okuloj, forbrulis via ĝojo de l' koro.

Longa ĝemo de plendo respondis.

Do li iris pluen kaj mokis ree.

— Ploru, la larmoj helpos vin multe. Ili levos novajn ŝtonojn, rekonstruos la murojn, revenigos la teksaĵojn kaj ricaĵojn. Ploru nur, ploru.

Kaj la ploro ne ĉesadis.

Li iris pluen kaj mokis konstante. La homoj tamen ŝajnis ne vidi lin, dronante en sia doloro.

Fine unu maljunulo levis al li la plendajn okulojn.

— Vin ŝajnas ĝojigi niaj larmoj, Herostrato—li diris malgaje.

— Jes, ĉar mi kaŭzis viajn larmojn.

— Vi?

— Mi.—Mi forbruligis la templon de Diano en Efezo.

—Vi! — kaj vi diras tion tiel malkaŝe — kun tia memlaŭdo?

Mi diras, por ke Vi sciu pri mi. Ĉar nun vi forgesos min neniam. Vi malŝatis min dum la tuta mia vivo, vi evitis min, piedpremis min sen konscio kaj pripenso, kiel plej malŝatatan teran vermon.—Kaj nune mi enpenetris vian memoron, viajn internaĵojn, kiel tiuj fajraj serpentoj enpenetris tiujn ĉi murojn. Kaj nun vi estos min konantaj, sciantaj pri mi—eterne.

Kaj li ekridis.

La maljunulo alrigardis lin mirigita.

— Kaj tial vi forbruligis la templon?

— Tial.

La maljunulo leviĝis kaj etendis la brakon al la amasoj.

— Popolo!—li diris montrante Horostraton—jen homo, kiu por vanta glordeziro forbruligis la templon de l' diino.

La ploro subite ĉesis.

— Do la dioj—parolis plue la maljunulo—donu al li, kion li deziris. Por ĉiuj tempoj nomo lia estu senmorta, nomo de frenezulo kaj malsaĝulo.

Surda, funebra silento estis respondo de l' amasoj. Leviĝis neniu ekkrio. Teruro fermis ĉies buŝojn. Kaj li staris kaj atendis, ĉu eble nun tiu amaso ĵetos sin kontraŭ li kun malbeno.

La amaso tamen silentis senĉese.

Fine tiu silento komencis lin premi. Lia rigardo fariĝis malpli provokanta. Ĉar li sentis, ke en tiuj miloblaj rigardoj turnitaj al li estis nek kolero, nek malamo.

Estis nur malestimo.

Kaj malestimo ne havas vortojn.

Kaj li komprenis, ke ĝi fluas al li senlima, kiel oceano kaj kiel oceano senindulga. Jam ĝi atingas lin, jam estas ĉe liaj piedoj, lev-

ĝas. Baldaŭ ĝi lin ĉirkaŭos, kaptos, dronigos. Kaj ne savos la forkuro. Ĝi sekvos lin, persekutos, trovos lin ĉie.

Kaptis lin timo.

La piedoj sub li ŝanceliĝis.

Li mallevis la okulojn.

Li eksentis, ke pli longe li ne tolèros tiujn malvarmajn, terurajn rigardojn, direktitajn al li.

Li preferus petegi, ke oni lin batu, prikraĉu, piedpremu, ke oni nur ne alrigardu lin tiamaniere, ke oni nur ne silentu.

Li sciis tamen, ke ne sufiĉus petoj, ne sufiĉus petegoj.

Do li komencis kuri.

Mallongedaŭra, nerva rido ekskuis la popo lamason.

Nenio pli.

Kaj li kuris, kuris—pli kaj pli malproksimen pro forflugi de tiuj rigardoj, de tiu silento, de tiu rido.

El pola lingvo tradukis

Br. Kuhl.



Tomas Krag.

La norvega fablo.

En ŝtonega, dezerta ĉirkaŭaĵo du fratinoj loĝis en malalta dometo. Tuttage ili restadis hejme. Nur vespere ili eliradis promenejon kaj renkontis la bonajn konatojn: venton, krepuskon kaj nebulon. Kaj reveninte, ili renkontis la eraran fajreton kurantan al marĉo kaj la strigon flugantan senbrue en arbaron. Dome li dormadis sur blanka lito en ĉambreto, kies fenestron ornamis konvaloj.

Sed iujare la pli juna renkontis viron junan kiel ŝi, sed fortan kaj nigroharan. Li demandis pri la vojo kaj ŝi montris ĝin al li.

— Vi tiel mirinde aspektas — diris li, rigardante ŝin. — Vi estas tiel hela kaj via spirado tiel delikata. Mi amas junajn, blondharajn knabinojn. Ŝajnas al mi, ke mi songis nokte pri vi. Eble vi ankaŭ songis pri mi?

Ŝi rakontis al li sian songon.

— Ho, kiel bela ĝi estas! Tiel ĉarmajn, delikatajn songojn havas nur knabinoj, kiuj baldaŭ mortos.

Ŝi ektimis, sed li konsolis ŝin: — Mi sangigos vin kaj gajigos kaj el konvalo vi fariĝos rozo. Venu hodiaŭ nokte tien, kie komenciĝas la arbaro.

*

Ambaŭ fratinoj kune iris sur la monteton,

— Fratineto, vi estas iel alia ol ordinare. Vi forgesas preni min je la mano.

— Jen mia mano. Mi volonte promenos kun vi.

— Sed vi estas aliĝinta. Vi ne klinas la kapeton antaŭ la vento, krepusko kaj nebulo.

— Ah, la vento estas tiel malvarma, la krepusko kaj nebulo estas blindaj.

— Kaj vi nenion diras, kiam ni renkontas la eraran fajreton kaj la strigon.

— Ah, la erara fajreto lumas tiel malforte, kaj la strigo krias terure.

Samvespere ili ne interparolis kiel kutime. Kiam ili alvenis al la monteto, la suno estis subiranta, kolorigante per purpuro la filikon, kaj la malpli juna fratino kantis kanteton pri la malproksima ĉielo kaj pri la kampaj floroj. Tiam la pli juna ridetis silente, ĝoje, kaj ekkantis per mola voĉo kanton, kiun la malpli juna neniam aŭdis — kanton pri la najtigaloj kaj rozoj, kaj ŝia buŝo fariĝis purpura, la vangoj flamantaj.

*

— Ah, kie estas mia fratineto? Kie ŝi iris unu, en la nokto? Ĉu vi ne vidis ŝin, blankaj konvaloj?

— Ni vidis, kiam ŝi eliris el la lito kaj la ĉambreto. Sed ŝi ne timas nin, kaj ne havas por ni eĉ unu vorton. Kien ŝi do iris, ni ne scias. Eliru kaj demandu la nebulon.

— Nebulo, ĉu vi ne scias, kien eliris mia fratino en la nokto?

— Mi sentis, ke iu tuŝis min en malfrua vespero. Mi demandis, kiu estas, sed mi ne ricevis respondon. Tial mi ne povas doni al

vi klarigojn; mi estas ja blinda. Sed demandu la eraran fajreton.

— Erara fajreto, fratino mia malaperis — kie mi devas ŝin serĉi? Ĉu vi ŝin ne vidis?

— Mi vidis, kiam ŝi eliris kaj mi volis lumigi al ŝi la vojon, sed ŝi kuris tro rapide... mi estas maljuna kaj laca. Demandu tamen la venton. Ĝi estas facilflugila, ĝi scias ĉion.

Do la malpli juna fratino demandis la venton. Kaj en la malalta herbo respondis ĝia siblo kolera kaj malgaja:

— Jes, mi scias, kie ŝi estas. Tie, ĉe la rando de l' arbaro ŝi trompas nin ĉiujn. Ĉar ŝi donas sin al homo el la lando de somero kaj suno. La kompatinda arbaro kaj sennutra tero plendis al mi sian mizeron.

— Vento! ne faru al ŝi malbonon; sed mortigu lin, mian malamikon, kiu forprenis al mi la fratinnon kaj al vi, infanon vian. Mortigu lin, la homon el la lando de somero kaj suno.

— Li ne apartenas al ni. La somero kaj suno juĝos lin.

— Ne faru malbonon al ŝi, ĉar ŝi estas mia fratino. Mi pardonas al ŝi, kvankam ŝi pekis kontraŭ mi, apud kiu ŝi dormadis sur la blanka lito en la ĉambreto.

— Vi kuraĝas peti pri ŝi kaj doni konsilon al ni, pli maljunaj ol vi? Rigardu, kiel la dezerto per morta neesto ridetas ĉe la amuziĝo de via fratino. Kaj nune kiam ŝia juna korpo tremetas kaj ŝi neĝa kaj feliĉa malfermetas la buŝon kun dentetoj blankaj kiel perloj, kiam ŝi ripozas dormetanta kaj per la duone vualita pupilo celas malproksimen — nune mi iros al ŝi kun mia glacia bloveto kaj ŝia nuda korpo

rigidiĝos de frosto kaj buŝo paliĝos kiel nebulo.


*

*

*

— Ah, nune, kiam la tago kliniĝas al la suna subiro, mi trovis fine mian fratineton. Malviva ŝi kuŝas sur la herbo kaj jen mi estas sola. Alvenu, ho vento kaj krepusko! Alvenu erara fajreto kaj nebulo kaj pardonu al mia fratino. Jen ŝi ree revenis al nigra termonteto, jen ŝi estas bona. Rigardu ŝian blankan vizaĝon, de kiu forkuris la rideto kaj la pupilo ekdormis per dormo eterna. Rigardu mian fratineton, malfeliĉan kampan floreteton, kiu fermis siajn foliojn por ĉiam.

trad. *Gorgan.*



KAZIMIERZ PRZERWA-TETMAJER.

El la rememoroj de pentristo.

(*novelo*).

Unu el la plej malĝojaj rememoroj, kiujn mi havas, estas la morto de Horveno. Li same mortis kiel vivis: sola, forlasita kaj tre malfeliĉa. Ni ambaŭ servis al unu sinjorino, al la arto; sed vere, al ĉio alia pli indas servi—nenia estas enspezo: Gloro? Se kune kun ĝi ne venas enspezo, nenio estas pli malsaĝa kaj pli ridiga ol la Gloro.

Horveno pentris tre honajn pejzaĝojn kaj dum li pentris ilin, iom da mono li ricevadis de „Artkomercistoj”, sed de kiam la ftizo kuŝigis lin en la liton, finiĝis la belegaj tagoj de l’ Aranĵuezo: li suferis mizeron. Ni, jes, ni estis, sed ni mem apenaŭ vegetis. Ni ĉiuj estis junaj, lernantoj de l’ Akademio, malproksime de hejmo, de proksimuloj, kiuj ja havas multe pli gravajn aferojn, ol zorgi pri la komencantaj junuloj.

La tuta Horvena garderobo, lia belega griza haveloko, je kiu li tiel ĝojis, lia pinglo kun perleto, porte-bonheur de ia kuzenino — ĉio malaperis.

Mi scias pri tio plej bone, ĉar mi mem vendadis tiujn ĉi objektojn al la komercantoj, aŭ portadis al lombardo.

Unu meztagon ĉarma Marto mi venis al Horveno. Apenaŭ mi malfermis la pordon, li vigle levigis de la lito kaj diris:

— Ĉu vi scias, kiu estis ĉi tie?

— Kiu? mi demandis, rimarkante tuj, ke li havas tre fortan febron.

— Estis la morto. Ĝi estis ĉirkaŭ dek-unua matene. Mi kuŝis kun fermitaj okuloj kiel subite ekblovis malvarmo. Mi malfermis la okulojn. La haroj ekstaris sur mia kapo. Kaj vi imagu al vi: ĝi sidis ĉi tie sur la lito. Ĝi estas sama kiel oni ĝin pentras: skeleto en longa mantelo. Ĉio en mi mortis pro teruro. Ĝi etendis al mi la manon kaj apogis sin sur mian bruston, ĉi tien... La frosto, tute glacia frosto min trapenetris... Poste ĉio malaperis..

— Halucinacio — mi interrompis, volante lin trankviligi.

— Ne, tio estis la morto... Kaj jam la fino...

Lia kapo falis sur la kusenon; li estis pala kiel tolo. Ne estis dube, ke tio estis la morto—Horveno finiĝadis.

Ni silentis kelkan tempon, poste li komencis paroli:

— Ĉu vi scias, tie, ĉe ni, en la nordo, tie estas tiel granda, granda lago. Ĉirkaŭe kreskas abioj, kaj avelujoj. Proksime de tiu ĉi lago staris mia domo.

Aŭskultu, mi volus, ke vi min tien transportu, alŝnuru al tabulo kaj jetu en la akvon: Ĉe ni, tie, en la nordo, flugas mevoj super la akvoj... Kiel mi volus, ke ili flugu super mi... Ĉu tio estas neebla, ke vi min tien

transportu, en la nordon al nia granda lago?...

Li parolis kun granda emocio: tiom da jaroj preteriris, kaj mi memoras ĉiun vorton.

Kaj ree ni silentis momenton; Horveno lev-
is iom la kapon, ekrigardis sin mem kaj la
litaĵon, diris, preskaŭ murmuretis, kun granda
malĝojo kaj plendo.

— Kiel ĉi tio estas malpura...

Efektive, lia ĉemizo, kovrilo sur la kuseno,
littuko, ĉio estis neŝanĝita, videble, jam de tre
longe.

— Kial Vi ne ordonos al la servistino
ŝanĝi tion?—mi demandis.

Li ekrigardis min ridetante kaj kun miro.

— Vi demandas? Vi ja mem helpis al mi
forvendi kaj enlombardigi ĉion, kion mi havis.
Mi nenion havas, kron tio, kion vi vidas ĉi
tie...

Spasmo kunpremis lian laringon, kaj
li klinis la kapon al la brusto kaj eksilentis.
Li silentis sufiĉe longe, poste ree parolis.



— Ne, ne ĉio. Tie en la ĉerko, mi hav-
as ankoraŭ unu puran littukon kaj unu ĉemiz-
on. Mi kaŝis tion speciale por la morto. Mi
ne povas ja kuŝi kiel almozulo. Mi ne
estas ankoraŭ tia mizerulo, kiel oni povus pensi:
mi havas purajn ĉemizon kaj tolaĵon. Ekzist-
as tiaj homoj, kiuj eĉ tion ne posedas ĉu
vere?...

— Do, mia kara: aŭskultu: kiam mi mort-
os, vi preparu ree por mi la liton kaj vestu
min freŝe, kaj poste, se vi povus, transportu
min tien al ni, al nordo, al nia granda lago;

alŝnuru min al tabulo kaj metu min en pura
ĉemizo sur la akvon...

Tie-ĉe ni, en la nordo, flugas mevoj; Vi
jetu min tie, en la akvon...

trad. *Nigra Kordo.*



ENHAVO:

	Paĝo.
El la „Epoko de Eŭnukoj” de Andrzej Niemojewski (fragmenfo) .	3
Fulmsubitaj fotografaĵoj de Kl.	
I. La gurdo	13
II. La gramofono	15
La forbrulo de l' templo de Diano en Efezo, de Zofio Rylska . . .	18
La norvega fablo, de Tomas Krag .	23
El la rememoroj de pentristo, de Kazimierz Przerwa-Tetmajer . .	27

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Esperanto

477 I